



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2010

*Kara Leganto! La lasta kunsido de nia E-societo donacis al la ĉeestintoj nekutiman, neordinaran prelegon pri la esperantiĝo de e-ludoj, kiuj ekzistis antaŭ la invento de la Interreto. Prelegis Riĉjo Ekstrom, esperantigisto de la ludoj, konatuloj de kiu ekis la ludaron. Vi povas ankaŭ trovi sube informon pri E-istino, doktorino, vera ŝikaganino, kiu (eĉ) verkis libron pri la internaciaj komunikiloj. Bedaŭrinde, ŝi nun loĝas ekster la limoj de la Ŝikagio (Chicagoland). Trie, ne forgesu pri la ĉi-jara E-pikniko, okazonta je la sama loko kaj je la sama tempo, kiel la pikniko'2009.*

*Kaj, finfine, la redakcio planas pligrandigi la formaton de nia bulteno, aldonante literaturan parton. Inaŭguras (pli ĝuste – daŭrigas) ĝin G. Dolgin per sia elrusigado de niaurba ruslingva aŭtorino Anna Lipko. Notu, ke la literaturaĵojn estas akireblaj nur elektrone. Pardonu, sed... – E-a mondo devas esti verda!*

–La Redakcio

## Grave: Tradicia E-pikniko!

La tradicia E-pikniko de la ŝikagaj E-istoj (kaj ne nur) okazis en la sama loko kiel pasintjara (2009) en la arbara rezervejo apartenanta al la komunumo de Franklin-a Parko (norda flanko de Irving Park Avenuo kaj okcidenta de Cumberland Avenuo). Ni penos rezervi la saman budon (la unuan de dekstre, se vi venos per iu veturigilo) de tagmezo kaj ĝis la malfrua vespero. Veturigontoj per la publika transporto bv iri al la plej lasta okcidenta haltejo de Irving Park-a buslinio n-ro 80. Oni pretas kunporti gesamideanojn ankaŭ de la “subtera” Blu-linia haltejo “Cumberland”. Ne hezitu telefoni al Viktoro (773) 344-2276. Bonvenon!



## KAToj kaj Sagoponto II

Antaŭ ol la Interreto, antaŭ ol America Online kaj Compuserve, jam ekzistis interkomputila komunikado: per privataj sistemoj, tra voĉtelefonlinioj. Mi estas unu de miloj da sisopoj (sistemaj operaciistoj), kiu jam posedis tiajn sistemojn.

Kion oni nun faras per Interreto, ekz. sendi kaj ricevi dosierojn kaj mesaĝojn, amuziĝi per ludoj, legi bultenojn – oni unue faris per tia sistemo. En 1975 Ward Chistiansen kaj Randy Seuss (kiujn mi konis persone) kreis tiun sistemon, la unuan en la mondo, kaj nomis ĝin angle “CBBS”: Computer Bulletin Board System (Komputila Anonc-tabula Sistemo – KATo). Nun oni nomas tian sistemon BBS, mi nomas mian (angle) North Woods BBS aŭ (E-e) la Norda Kverka KATo.

Krom mesaĝoj (angle kaj E-e) mia KATo enhavas kelkdekojn da ludoj. Plejparte ili estas anglalingvaj, sed dum lastaj jaroj mi pograde esperantigis vortludon, testan ludon, grafitan muron kaj ĝis nun unu RPG-n (angle Role Playing Game, Rola Luda Ludo), simila al Dungeons and Dragons (Kavernoj kaj Drakoj). Mi nomas ĝin Kavernoj kaj Kreitaĵoj.

Maje mi jam montris al E-istoj tiun, kiu nomiĝas (angle) Arrowbridge II, E-e – Sagoponto II. La vortan (testetan) ludon oni povas ludi kaj fini en kelkaj minutoj, sed KkK daŭras dum monatoj, eĉ – jaroj. Unue oni kreas meman karakteron: elektu unun el 6 rolaj profesioj – Prodo (Kavaliro), plej bona batalisto; Kleriko, bone resanigas de difektoj kaj veneno; Arbaristo, iras rapide kaj pograde resanigas; Ŝtelisto, malfermas ŝlositajn pordojn kaj trezorkestojn sen eksplodi kaŝitajn bombojn, Sorĉisto, faras potencan magion; Pafarkisto, per pafarko duoble difektas malamikojn.

Dekomence, vi ne tre lertus, sed gajnos sperton kaj povon vagante tra la mapo de liberaj kampoj, arbaroj, montetoj, dum vi velŝipos transmaren, esploros kavernojn kaj drakajn kuŝejojn, batalos fi-monstrojn laste plagintaj la landon. Fine vi plenumos specialajn misiojn de la granda sorĉisto Merksa. Vi turniros kaj dueloj kontraŭ aliaj ludantoj...

–Rikardo Ekstrom



## Vojo al Paradizo

Ekde televidilo sonis antaŭnovjara reklamo, alvokanta viziti ekspozicion de simple aĉeteblaj pentraĵoj. Sur la ekrano ŝanĝiĝis kolorigitaj pejzaĝoj, naturmortoj, portretoj, kies etaj prezoj miris. Dekomence Ketrin spektis la admonojn “preterorele”, tamen oni, rompante eĉ sportan programon, trudeme atakis, kaj fin-fine devigis atenti... Pririgardinte murojn de sia loĝejo, Ketrin ekpensis, ke negranda bilda pejzaĝo super ŝia divano povus plibonigi la aŭron. Baldaŭ oni diktis: “La granda ekspozicio lokiĝos en ĉikaga hotelo “Redison” kaj funkcios nur la 30-an decembre, ekde 9-a matene ĝis la 2-a posttagmeze”. “Sekve, ĝi okazos morgaŭ”, – konstatis Ketrin, enskribinte la informon... (vd la retejon – red.)

–Anna Lipko

## Arika

Arika Okrent naskiĝis en Ŝikago, kaj kvankam ŝiaj gepatroj ne estis E-istoj, ili havis hejme E-an vortaron de John Wells. Ŝi ĉiam ŝatis lingvojn kaj lernis “iomete” de l’ abunda lingvaro, relative flue posedante la hungaran kaj la usonan gest-lingvojn. Ŝi studis lingvistikon kaj psikologion en la Universitato de Ŝikago, gajninte doktorecon en 2004. De tiu tempo ŝi jam komencis pristudi la sovaĝan, miraklan historion de lingva inventado, kio rezultigis en la apero de la libro “In the Land of Invented Languages” (En la lando de inventitaj lingvoj – red.). Plian informon oni povas ĉerpi de la retejo: arikaokrent.com.



## El nia leterkesto

– La Estraro de Rotary International, kiu stimulas la rotarianojn kun komunaj interesoj pri fakaj, humanecaj, kulturaj aŭ distraj aktivecoj starigi neformalajn grupojn por realigi la celojn de R.I., invitas vin subteni la grupon RADE (Rotaria Amikaro de E-o), konsistanta el rotarianoj, kiuj uzas kaj apogas la IL E-on, kaj celas realigi la idealojn de R.I. por interkompreno, amikeco kaj paco inter la nacioj, faciligi la personajn kontaktojn inter rotarianoj de malsama lingvo-deveno kaj disvastigi la humanecajn internaciajn servojn de R.I. Bv kontakti sekretarion de RADE, s-ron Giuseppe Grattapaglia: bonaespero@terra.com.br



– Brazila E-isto Celso Martins (C.P. 61003 – vila Militar, 21615-970 – Rio de Janeiro, RJ, Brazilo) petas sendi al li malnovajn E-ajn ĵurnalojn, gazetojn, bultenojn, eseojn, bildojn, librojn por daŭrigi lian senlaca laboron por nia sankta ideo.

– Kostarika E-isto Andreas Pridybailo (22), studento pri agronomio en Kostarika Universitato, pasigos du semajnojn en Universitato de Iowa, post tio, eble, je la komenco de Aŭgusto li vizitos Ŝikagon por unu semajno. Ĉu iu povus gastigi lin aŭ ĉiĉeronadi tra la urbo? Bv respondi rete: agleto@gmail.com

– PIEADC (Programo de iniciato kaj enkadriĝo por la komunuma sidvolvo), kreita por E-istoj de orienta RDKongolando, klopodas trovi instituciojn povantaj helpi realigi projektojn en birdobredado, fiŝkulturado kaj renovigo de laĝetoj. Bv kontakti Etienne Katchelewa, prezidanton de PIEADC: pieadc2006@yahoo.fr

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O’Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library  
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL  
Kunvenoj komenciĝas  
je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Junio – tradicia pikniko en Franklin-a Parko (norda flanko de Irving Park Avenue kaj okcidenta de Cumberland Avenue)– vidu p. 1

27an de Julio – Andreo Kolganov klarigos pri “Utilkompanioj de Usono: Akvo, Elektro, Gaso”

24an de Aŭgusto – kunsido dediĉata al UK en Havano